# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 31/03/2022 Kvincentsepdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 753,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **297,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **186,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **165,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **105,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



la [esperanta retradio](#) 19 mar 2022



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

ŜPARI VIRTUALAN AKVON 26 MAR 2022

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**Numero 8 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kion oni povas diri anstataŭ "La domo en kiu mi loĝis antaŭe" ?

2).. En la frazo kun subfrazo "Li salajrumas same multe kiom mi (salajrumas)" kiaj vortspecoj estas la antecedento kaj la subfraza relativa vorto?

3). Kial en la pasiva kaj mediala voĉoj la predikato devas esti nur unu vorto?

4). Ĉu ĉiuj partoj de propozicio havas en Esperanto kernvorton?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 576. *Marcel Leereveld.*

# El Brizbano




Foto montras de maldekstro: Caroline, Erhard, Linda, Paŭlo, Tara, "verda" Petro, Johano, Doug.

La foto montras membrojn de la Brizbana Esperanto-Societo dum la monata kunveno kaj Jarkunveno. La membroj elektis novan komitaton. Ankaŭ la jara raporto estis prezentita.

*Petro Danzer*

# Soldatoj kaj pacifistoj

En AE Gordon Coleman pasie prezentis vidpunkton de ekssoldato kaj asertis, ke soldatoj estas la plej bonaj garantiantoj de paco. Kvankam Gordon ne rekte kritikis pacifistojn, li aludis al malnova diro, ke pacifistoj povas vivi kaj prezenti sian filozofion nur pro tio, ke soldatoj protektas ilin.

Certe estas vero en la aserto, ke ofte estas malfacile pravigi pacifismon en specifaj situacioj. Kion faru pacifistoj en la nuna Ukrainio? Kiel pacifistoj povintus agi kontraŭ Hitler?

Mi tute ne dubas, ke Gordon estas sincera homo, fiera pri la soldata familia tradicio. Tamen la vidpunkto, ke soldatoj gardas pacon, baziĝas sur mallarĝa naciisma sento. Se lando A soldatigas siajn civitanojn kaj akiras pli kaj pli da armiloj, la "malamikaj" landoj devas fari same. Eblas, ke en ĉiu lando la soldatoj sincere kredas -- aŭ akceptas la propagandon de sia registaro -- ke ili agas nur por defendi sian landon aŭ garantii pacon. Kiom da entuziasmaj junaj germanoj estis konvinkitaj en 1914 kaj 1939, ke ili protektas Germanion kontraŭ agreso de aliaj landoj? Kiom da junaj rusoj ankoraŭ kredas, ke ilia agado en Ukrainio estas nobla kaj paciga? Kion kredas la amasarmeoj de Norda Koreio kaj Ĉinio, de Usono kaj Israelo kaj Irano, kaj tiel plu?

Tia blinda lojaleco al la propra lando/religio/raso, kaj la nekapablo aŭ rifuzo kompreni, ke homoj simile pensas kaj sentas en "malamikaj" landoj, kutime havas unu rezulton: militon.

Vera paco venos nur, kiam ne plu estos armeoj. *Se vi volas pacon, preparu militon* estas antikva diro profunde malĝusta. La diro devus esti: *Se vi preparas militon, milito okazos.*

Jes, eblas aserti, ke la pacifismo ĵus esprimita estas naiva kaj ignoras la realan situacion. Eble ĝi restos nerealisma, dum la homaro vivas en naciaj kaĝoj kaj kredas negativaĵojn pri homoj en aliaj kaĝoj (kaj tiaj miskredoj estas kutime disvastigataj de regantaj klikoj).

Antaŭ kelkaj jardekoj ni spektis televidan serion far kanada spertulo pri edukado de soldatoj. Li donis grandan parton de la programo al *West Point,* la plej prestiĝa militakademio en Usono, kaj ĝia ekvivalento en Sovetunio, sed ne neglektis soldatedukejojn en aliaj landoj. Fine de la programo li verdiktis: kio ajn estu la flankaj avantaĝoj, la ĉefa celo de trejniĝo de soldatoj estas igi ilin laŭ ordono mortigi aliajn homojn, kio estas kontraŭ la sentoj de preskaŭ ĉiu normala homo.

Probable en ĉiu epoko estis homoj, kiuj kredis (ofte surbaze de bibliaj "profetaĵoj"), ke la fino de la mondo estas proksima. Nu, ni en la 21-a jarcento alfrontas almenaŭ du minacojn, kiuj vere povus detrui nian planedon kiel vivejon de homoj kaj aliaj bestoj: nukleaj bomboj kaj klimata katastrofo.

Nia sola ŝanco eviti katastrofon estas tuthomara kunlaborado. Tio implicas forigon de la nunaj potencstrukturoj kaj bubaĉaj prestiĝkonkurencoj de armehavaj nacioj. Unu elemento de tio estas pacifismo, la konvinkiĝo, ke ĉie la granda plimulto de homoj volas vivi pace, ke militoj nenion solvas kaj estas absurdaj.



Eta antaŭsigno de tiu tutmonda solidareco estas, ke jam ekzistas vere tuthomara lingvo, kiu povus helpi revoluciigi rilatojn inter homoj.

*Trevor Steele*

# Aliro al Kanado por la UK

La federacia registaro de Kanado anoncis la finon de la devigo prezenti negativan KOVIM-teston por plene vakcinitaj vojaĝantoj Jen bonvena novaĵo por la Universala Kongreso en Montrealo, ĉar tio signifas, ke la plene vakcinitaj vojaĝantoj ne devos fari la testadon en siaj hejmlando, antaŭ alveno Kanaden, nek fari KOVIM-teston. Hazarde elektitaj homoj tamen devos trapasi PCR-teston je la alveno, sed ne devos izoliĝi dum ili atendos la rezultojn. "Simple alvenu, plenvakcinita, en bona sano kaj bona humoro, por ĝui la plej grandan Esperantan eventon de la jaro!", diras Ĵenja Amis, sekretario de la LKK por Montrealo.

La registaro de Kebekio anoncis mildigojn rilatajn al KOVIM-reguloj. Ekde marto 2022 la registaro de Kebekio ne plu starigas limigojn pri la kvanto de personoj, kiuj povas ĉeesti kune en la sama ejo. Kaj vakcin-pruviloj ne plu estas bezonataj por partopreni kongresojn aŭ viziti aliajn lokojn – ekzemple restoraciojn, koncertejojn, kinejojn, teatrojn, ktp. Krome, ekde marto, oni ne plu estas devigata labori dehejme kaj la neceso porti la maskon fariĝas malpli strikta – nur en la publika transporto.

Jen la vakcinoj, kiuj nun estas akcepteblaj por eniri Kanadon:

AstraZeneca/COVISHIELD (ChAdOx1-S, Vaxzevria, AZD1222);
Bharat Biotech (Covaxin, BBV152 A, B, C);
Janssen/Johnson & Johnson; Moderna (mRNA-1273);
Novavax (NVX-COV2373, Nuvaxovid, Covovax);
Pfizer-BioNTech (Comirnaty, tozinameran, BNT162b2), ankaŭ por infanoj inter 5- kaj 11-jaraj.
Sinopharm BIBP (BBIBP-CorV); kaj Sinovac (CoronaVac, PiCoVacc). La lasta dozo devas esti ricevita almenaŭ 15 tagojn antaŭ la alveno al Kanado.

La reguloj por vojaĝantoj legeblas ĉe voyage.gc.ca/voyage-covid (france) kaj travel.gc.ca/travel-covid (angle). La reguloj povus ŝanĝiĝi en la venontaj monatoj.

"Tio estas bonvenaj ŝanĝoj, kaj federaci-nivele, kaj provinc-nivele", diras la prezidanto de LKK por Montrealo, Normando Fleury. "Tio efektive signifas la verdan lumon de la registaro al kongresoj kaj aliaj eventoj", aldonas Ĵenja Amis: "Kanado estas tre sekura lando, kun pli ol 80% da loĝantoj plene vakcinitaj. Aldone, dum la UK estos surloke kongresa kuracisto kaj la protokolo kaj rekomendoj por protekti la sanon de ĉiuj partoprenantoj estos sekvataj." Aliĝi al la 107-a UK eblas en uea.org/kongresoj/alighilo (kun rabato ĝis la 31-a de marto 2022):



Sendis *Katja Steele*

# John Massam

**KIEL ESPERANTO KOMENCIĜIS POR 90-JARAĜA JOHN MASSAM, EN VEPREJA KABANETO ANTAŬ OL LI NASKIĜIS.** de *John Massam* (Tradukis *Vera Payne*)

Mia patro Tom Massam (1900-1961) kaj lia frato Jack (1897-1980) estis du el familio de naŭ infanoj, kiuj elmigris el Lancashire, Anglujo, alvenante al *Fremantle* la 27an de januaro 1913. En aprilo 1917 ili komencis pioniri farmbienon kiun ili nomis *Scarisbrick*, ĉe Yerapin en la distrikto *Bruce Rock*, Okcidenta Aŭstralio. Ĉi duo tie dehakis multajn arbojn.

> **Naskiĝtaga meŝaĝkarto**
>
> GRANDIOZAN NASKIĜTAGON!
> NAŬDEK ESTAS MIRINDA AĜO
> ESTAS TEMPO-MOMENTO POR PAŬZI
> KAJ KONSIDERI PASINTAJN MEMOROJN,
> ATINGOJN KAJ ĈIUJN EL LA INTERESAJ
> AFEROJ

Ĉirkaŭ la 1920aj ili loĝis en vepreja kabaneto (angle *humpy*) ne malproksime de la ĉefa domo, ankaŭ konstruita de vepreja ligno.

Iel ili eltrovis Esperanton, kaj komencis lerni ĝin en la kabaneto, je lampolumo, ĉirkaŭ la 1920-aj aŭ 30-aj. Pli poste, ĉi du komencis propran farmbienon en la distrikto *Narambeen*. Eble ili tiam ĉesis la studadon. Ambaŭ geedziĝis en 1931 kaj baldaŭ fariĝis patroj. Tre baldaŭ la Granda Depresio devigis ilin forlasi la bienon, post la naskiĝo de mi kaj mia kuzino *Dorothea* en 1932 kaj mia frato *Thomas* en 1933.

Mia patro kaj patrino (*Kit*, aŭ *Catherine*, 1897-1963) translokiĝis al Perth, kie naskiĝis tri pliaj infanoj. En miaj 20-aj, mi aĉetis Esperanto-kurson kaj vortaron, kaj iomete studis ĉehejme.

Probable en 1994 mia edzino (*Joan*, naskita *Norris* en 1933) kaj mi, kun nia plej juna filo (*Keith*, naskita 1971) vizitis montradon de diversaj grupoj sur verda gresejo apud la Rivero Cigno. Keith vidis montraĵon de la Esperanto Ligo de Okcidenta Aŭstralio, tiun tagon prizorgita de S-ino Idyss Einihovici.

Keith diris, ke li memoris min paroli pri mia pacĵo kaj onklo iam lernante Esperanton, kaj, ke li ankaŭ volis lerni. Ni tri kontaktis iun en ELOA kaj komencis studi kun kelkaj aliaj en la Esperanto sidejo en Victoria Park. La instruisto estis S-ro *Rene Smeets*. S-ino *Bernie Thomjas* kaj alia lernantino, *Phyllis*, ankaŭ venis.

Kiam la Ligo vendis sian oficejeton, klasoj daŭris ĉe la hejmo de *Rene* kaj *Mia Smeets* en *Mt Hawthorn.*

Bedaŭrinde, mia edzino Joan ĉesis lerni. Keith kaj mi sukcesis en la Baza ekzameno en 2002, kaj ankoraŭ partoprenas en la Esperanto-Rondoj ĉe *King's Park*, kun *Shayne Power, Shirley Gradussov, Trish O'Connor* kaj *Ron Cameron.* *John Massam*

# ILEI en Oceanio

Oceaniaj projektoj nun inkluzivas planojn por prezenti Esperanton kiel taŭgan elekton al *Montessori* lernejoj, *Steiner/Waldorf* lernejoj, Infanaj Hejmlernantoj kaj Gepatroj de Infanetoj.

Jen la fejsbuka grupo **Esperanto Education in Oceania (ILEI Oceanio)** Sendis *Katja Steele*





*https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html*
_kaj por la historio de la situacio kaj la aliaj flankoj de la kialoj
https://www.greanvillepost.com/ https://sputniknews.com/
indian world news *Roger Springer*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). "La domo, kie mi loĝis antaŭe.".
2). Antecedento: Adverbo.
La relativa vorto: (Relativa) Adverbo. *Marcel Leereveld*
3). Ĉar temas pri nur unu ago.
4). Jes, escepte se la parto estas frazo komencanta per la subjunkcioj "ke" aŭ "ĉu" aŭ "ĉar".

Usona prezidento Joe Biden, asertas, ke la valoro de pli ol miliardo da dolaroj da armilaroj, kiujn li verŝis en Ukrainion - sufiĉe por ke ĉiu civitano mortigu ĉiun alian plurfoje - devas defendi la "liberecon" kaj "dignon" de tiu nacio.

Impoverishing Ukraine: What the US and the EU have been doing to the country for the past 30 years - World Socialist Web Site (wsws.org) Legible en 28 lingvoj sed ne Esperanto

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*

## La milita (defenda) elspezo de Aŭstralio superas $ 500b

Australia's defence spending tops $500b (msn.com)

Eble kontraŭmilitaj politikanoj povos malpliigi vian imposton kaj savi la planedon
Pensu pri tio kiam vi baldaŭ voĉdonos *Roger Springer*



**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 28a de marto 2022 estas singardo kontraŭ kibernetikaj atakoj , rifuĝintoj en Novzelando kaj indiĝenoj en Brita Kolombio ( Kanado) , esperantisto fariĝas sanktulo kaj fine kion la vojaĝantoj forgesas en la trajnoj kaj stacidomoj kaj kiel en Belgujo la posedanto kaj la posedaĵo estas 80% de la tempo rekunigitaj .
Nun la administrantoj de la radio 3ZZZ renovigas la retejon , do la elsendo estos rete aŭskultebla nur kiam la retejo estos preta . Mi pardonpetas pro tiu ĝeno. *Franciska Toubale*